# JURA TRIBUNO INTERNACIA §

N-ro 12
Jaro 2013
Esperanta Jura Asocio

Eldonas: ESPERANTA JURA ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: esperanto14@ono.com

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Prof. Luis Córdova Arellano
S-ro André Ruysschaert
S-ro Guido Ricci

La revuon ricevas ĉiuj membroj de EJA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 7-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

# ENHAVO

Paĝo

| | |
|---|---|
| Prezento | 5 |
| Vivo de la Asocio kaj Esperantaj Juraj Informoj | 9 |
| Raporto pri la agadoj de EJA dum la Universala Kongreso. Hanojo 2012 | 12 |
| Eŭropa Unio, Nobelpremiita | 15 |
| Advokatado en Angolo | 23 |
| La Graveco zorgi la Medion | 27 |
| Kazo C-566/10-P ĉe la Kortumo (Granda Ĉambro) de EU *Italio kontraŭ la Komisiono.* | 43 |
| Juraj Vortoj*: Alimento* | 45 |
| Juraj Informoj: | |
| § Ne eblas la rajto je forgesado. | 47 |
| § Grava juĝo rilata al la patento de homaj genoj. | 48 |
| § Nuligita la juĝo kiu kondamnis al gvatemala ĝeneralo. | 49 |
| Dosiero pri nova ŝtato: Sud-Sudano | 50 |
| Nekrologoj | 51 |

# P R E Z E N T O

Nia revuo naskiĝis ĝuste antaŭ 15 jaroj. Tiam, ĝi nur volis sekvi, kaj se eble anstataŭi, tiun karmemoran publikaĵon nomitan *Internacia Jura Revuo*, kiu dum pli ol 20 jaroj kaj tra 36 numeroj estis la voĉo de la jura mondo en la zamenhofa lingvo. Hodiaŭ, 15 jarojn poste, *Jura Tribuno Internacia* estas tiu voĉo, la organo de la profesiuloj kiuj en la esperanto-movado rilatas al la jura medio. Kaj ĉi ĉio dank'al la konstanta apogo unue de Esperanta Jura Asocio kaj poste de niaj legantoj, ĉu membroj de la Asocio, ĉu simpatiantoj.

Sur ĉiu numero ni alvokas la legantojn partopreni en la redaktado de la revuo pere de la sendo de eseoj, informoj, mallongaj novaĵoj, ktp. Ĉi-foje ni sukcesis altiri la atenton de grava nombro de legantoj kiuj sendis al ni sufiĉe altkvalitajn kunlaboraĵojn, kaj pro tio ni, tutfiere, prezentas al Vi la n-ron 12-an de *Jura Tribuno Internacia*.

Ene de ĝi Vi trovos raporton pri la kunveno de la asocio en Hanojo dum la pasintjara UK. Nia asocio, kiel la tuta esperanto-movado, ne konas landlimojn, kaj pro tio ni komforte renkontiĝas en la varma kaj bela Vjetnamo aŭ ĉi-jare en la nordopolusa Islando. Do, ni invitas al Vi legi unue kion ni faris en Vjetnamo pasintjare. Poste, Rafaela Urueña, nia kara prezidantino, verkis artikolon pri Eŭropa Unio. Pasintjare ĉi tiu komunumo de ŝtatoj atingis la pacan nobelpremion, multaj surpriziĝis pri ĉi tiu premio, sed tiu aljuĝo ne devas esti stranga, sufiĉas vidi kiamaniere troviĝis Eŭropo dum la unua duono de la pasinta jarcento kaj kiel ĝi bonfartas ekde la fondiĝo de la Eŭropaj Komunumoj en la jaro 1951 ĝis hodiaŭ, kiam Eŭropo estas kontinento kie regas la Paco, escepte de la jaroj kiam okazis tiuj malbenataj militoj en la eksa Jugoslavio. Rafaela Urueña ankaŭ estas la aŭtorino de alia eseo, ĉi-foje pri la graveco zorgi la medion. La hispana profesorino jam prelegis pri ĉi tiu temo diversloke kaj ĉi-foje ni havas la ŝancon scii ĉi tie pri tre aktuala temo.

Nia portugala samideano Miguel Faria de Bastos, advokato en Portugalio kaj ankaŭ en Angolo, verkis artikolon pri la advokata profesio en Angolo. Estas kurioze vidi kiamaniere povas ŝanĝi la advokatan profesion samtempe al la politikaj ŝanĝoj en lando, antaŭ kelkaj jardekoj submetita al koloniisma reĝimo ĝis nun. Miguel Faria de Bastos atingas sciigi al ni pri temo, pri kiu verdire estas malfacile trovi informojn en la plejmulto el la naciaj lingvoj.

Guido Ricci, komentas sur ĉi tiu numero de nia revuo, juĝon de la Eŭropa Kortumo kie la ĉefa temo estas la graveco disvastigi konkuron, ĉi-foje rilata al dungado de oficistoj, ne nur en malmultaj lingvoj. En Eŭropo nun ekzistas 24 oficialaj lingvoj, ĉiuj ja oficialaj sed neniu reganta, aŭ almenau tiel devus esti. Ricci sciigas al ni pri kazo kie la supozata graveco de iuj lingvoj (nome la angla, franca kaj germana) estas detruita koncepto fare de proceso ekigita de ŝtato kiu petis sian rajton diskonigi ĉiujn informojn ankaŭ en la aliaj lingvoj, kaj ĝi sukcesis.

Sur la rubriko "Juraj Vortoj" ĉi-numere ni pritraktas la "rajton je alimento". Temas pri la rajto de iuj familianoj rilate aliajn por ricevi la necesajn viv-rimedojn, se tiuj ne povas ĝui ilin. Kaj fine ene de la mallonga sekcio Juraj informoj ni diskonigis kelkajn juĝojn kie ĉefrolas la interreta entrepreno Guglo en proceso pri privataj datumoj, usona kortumo rilate la pretendon patenti la homajn genojn kaj fine la nuligo de juĝo prononcita kontraŭ gvatemala eks-diktadoro.

Fine, ni memoras du karajn samideanojn, unu el ili membro de nia asocio, kiuj forpasis dum la lasta jaro. Unue Lucas Yamussura, brazila samideano, advokato, membro de EJA kiu subite forpasis antaŭ kelkaj monatoj, ali la ĉeĥa Karel Traxler, juĝisto, kiu dum la 80-a jardeko preparis du vortarojn en esperanto kaj en la ĉeĥa pri juraj terminoj. Sur malmultaj linioj ne eblas resumi vivojn, ĉu longa, ĉu mallonga, tamen estis nia devo diskonigi tiujn niajn du samideanojn kiuj verdire meritas memoron fare de ni kaj al ili ambaŭ ni dediĉas ĉi tiun 12-an numeron de Jura Tribuno Internacia, kiun ni invitas Vin eklegi.

*José María Rodríguez Hernández*
*Direktoro de JURA TRIBUNO INTERNACIA*

# ALIĜU AL
# ESPERANTA JURA ASOCIO

Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri juro aŭ esti studanto por tia diplomo. Ĉiu alia persono povas peti aliĝon kiel asocia membro. Membriĝo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko. Kaj 14 eurojn se vi loĝas en alia lando.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA). Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al la sekretario luisesperanto@yahoo.com aŭ al la elektronika adreso: esperanto14@ono.com

# Kunlaboru kun
# *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filosofía, administracia, ktp. Pri la

longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: Vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato junio 2014, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2014.

La redakciaj adresoj estas:
🖂 *Jura Tribuno Internacia.* Apartado de Correos 3142 E-14080 Córdoba (Hispanio)
💻 esperanto14@ono.com

# VIVO DE LA ASOCIO KAJ ESPERANTAJ JURAJ INFORMOJ

## ★ Kurso en la Universitato de Esperanto

Kiel anoncite sur la pasintjara numero de nia revuo, komenciĝis la kurso "Alfronti Militon" kadre de la interreta projekto Universitato de Esperanto. La instruanto estas la usona eminenta profesoro Ronald GLOSSOP. La kurso estas libere alirebla ĉe www.universitato.info kaj ĝi konsistas el 20 lecionoj.

Profesoro GLOSSOP ja spertas pri instruado ĉar li dum multaj jaroj estis universitata profesoro. La parolado baziĝas sur la teksto de GLOSSOP *"Confronting War"*, pri kiu esperable baldaŭ ekzistos esperantlingva versio.

Ni invitas al ĉiuj interesitoj viziti la kurson kaj sekvi la lecionojn de la Profesoro GLOSSOP. La Universitato de Esperanto estas malferma por ĉiuj lernantoj kiuj havas sufiĉe bonan nivelon de espranto por sekvi paroladon, kaj kiuj kapablas sekvi universitatan nivelan kurson. La aliro al la lecionoj estas tre facila, ne ekzistas registriĝo, uzulnomo kaj pasvorto.

## ★ Esperanto en la UN-Packomitato en Vieno

Nia lingvo kaj movado estis prezentita la 20an de novembro 2012 en kunveno de la Packomitato de Neregistaraj Organizoj en la Viena sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. La kunvenon prezidis D-ro Hans Michael Maitzen, ĉefreprezentanto de UEA ĉe UN en Vieno. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de 12 membro-organizaĵoj de la Packomitato. Mag. Bernhard Tuider, ankaŭ reprezentanto de UEA en Vieno, prelegis pri la 125- jara movado por la disvastigo de esperanto.

En sia referaĵo Tuider reliefigis la koherecon de la paca idealo de la Esperanto-movado kun tiu de la porpacaj grupoj kaj movadoj burĝonintaj antaŭ la unua mondmilito.

(el la revuo *Esperanto* n-ro 1266 (2))

## ★ Prelego kaj Kurso de esperanto en Jura Fakultato de Meksiko

Kiel jam okazis pasintjare, denove komence de la jaro 2013 la Sekretario de Esperanta Jura Asocio, Profesoro Luis Córdova Arellano, organizis konferencon kaj poste kurson de esperanto en Meksika Universitato.

La konferenco pri la internacia lingvo okazis en la Fakultato pri Juro de la Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko la 21-a de februaro 2013. La kurson poste oni organizis en tiu sama Fakultato de la 23-a de februaro ĝis la 1-a de junio por gelernantoj el diversaj fakoj (juro, fiziko, komunikado, internaciaj rilatoj, kemio, ktp. Partoprenis en la kurso 10 gerlernantoj.



La kurso de esperanto en la Jura Fakultato de la Nacia Aŭtonoma Universitato finiĝis per komuna vesper-manĝo.

### ★ Baldaŭa nova libro pri la Eŭropa Unio

Sub la titolo *"Eŭropo, paŝon post paŝo",* la Prezidantino de Esperanta Jura Asocio, D-ino Rafaela Urueña Álvarez, jam finpretis manuskripton kie ŝi pritraktas la historion, realon kaj defiojn de la Eŭropa Unio. D-ino Urueña estas membro de la Katedro "Jean Monnet" kaj membro de Instituto pri Eŭropaj Studoj de la Universitato de Valladolid (Hispanio), kie ŝi estis dum multaj jaroj Profesorino pri Internacia Juro. Espereble la manuskripto baldaŭ fariĝos libro eldonita de nia asocio mem.

# Raporto pri la agadoj de Esperanta Jura Asocio dum la Universala Kongreso Hanojo 2012

La Universala Kongreso de la jaro 2012, okazinta en Hanojo (Vjetnamio), alportis novan eblecon al nia asocio, nome la partoprenon, unuafoje, en la Movada Forio. Tiu gaja evento okazas lastatempe dum la Universalaj Kongresoj por ke ĉiu asocio aŭ partoprenantaj movadoj havu eblecon prezenti sin antaŭ la kongresanoj, kaj samtempe oni povu babili kaj interkonatiĝi iuj kun la aliaj, do, kiel vera interkona vespero.

Ĉi-jare, unuafoje, ni estis invitataj kiel asocio kaj oni pretigis por ni tablon. La Movada Foiro okazis sabaton la 28-an de julio, antaŭ la komenco de la Kongreso kaj la Prezidantino de EJA, D-ino Rafaela Urueña, estis ĉe la tablo, ŝi prezentis nian revuon kaj eĉ okazis nova aliĝo al nia asocio. Verdire, temis pri nova sperto gaja kaj sukcesa.



Membroj de Esperanta Jura Asocio atente aŭskultas la prelegon de Miguel Faria de Bastos (Foto: Luis Hernández)

Aliflanke, post alvoko aperinta sur la numero 4-a de la Kongresa Kuriero, jaŭde la 2-an de aŭgusto, je la 11-a horo, ĉe la kafejo de la hotelo Meliá Hanoi, deko da juristoj kunsidis. Unue, la Prezidantino de EJA raportis pri la agado de nia asocio dum la jara periodo, elstarante la akuratecon en la aperigo de nia revuo *Jura Tribuno Internacia*, danke al la agado de ĝia direktoro, S-ro José María Rodríguez, kaj al la vigleco de nia sekretario, S-ro Luis Córdova Arellano, kiu laboras por esperanto en la Jura Fakultato de la Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko, per la okazigo de konferencoj kaj kursoj.

La Prezidantino poste instigis la ĉeestantojn pagi la kotizon regule, per la UEA-konto aŭ per alia medio.

Poste, ŝi prezentis S-ron Miguel FARIA DE BASTOS, advokato en Luando (Angolo) kaj Lisbono (Portugalio). Li prelegis, klare kaj skize pri la temo "Advokatado en Angolo", afero kiun li prezentis laŭ la diversaj historiaj fazoj de tiu lando, ekde la koloniisma epoko, sekve la sendependiĝo kaj la diversaj etapoj ĝis la aprobo de la nuntempa Angola Konstitucio de la jaro 2010.



Demandoj post la prelego de S-ro FARIA DE BASTOS ne mankis
(Foto: Luis Hernández)

La prelego estis tre ŝatata de la ĉeestantoj kaj tuj sekvis demandoj kaj klarigoj pri tiu interesa temo, kiu daŭris ĝis la 12:35 horo.

Raporto pri la okazigo de nia kunsido aperis sur la numero 3-a de la Kongresa Kuriero. La revuon *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de nia asocio, oni disdonis al tiuj membroj kiuj ne ricevis ĝin dum la Movada Foiro kaj eĉ al aliaj interesitoj, kun la celo atingi novajn aliĝon al nia asocio.

Raportis: María Rafaela Urueña Álvarez
Prezidantino de Esperanta Jura Asocio



Esperanta Jura Asocio invitas ĉiujn membrojn kaj simpatiantojn ĉeesti la 98-an Universalan Kongreson de Esperanto, okazonta en Rejkjaviko (Islando) de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2013.

# EŬROPA UNIO, NOBELPREMIITO

✍ **D-ino María Rafaela Urueña Álvarez**
**Prof. pri Internacia Juro kaj membro de la Katedro "Jean Monnet". Membro de Instituto pri Eŭropaj Studoj de la Universitato de Valladolid (Hispanio).**

Kiam la 12-an de oktobro 2012 Eŭropa Unio ricevis la Nobelpremion pri Paco, konkurante kun aliaj 231 kandidatoj, inter ili 43 organizoj, multaj homoj surpriziĝis kaj eĉ kritikis malfavore tiun premion, kun la opinio, ke Eŭropa Unio ne meritis ĝin.

Vere ni konas Eŭropan Union kiel aron da 27 membroj kiuj havas komunajn politikojn kaj komunan leĝaron, sed nun, pli ol neniam, pro la terura krizo ekzistanta, granda parto el la eŭropa popolo konsideras, ke la celo de tiu Organizo estas ĉefe ekonomia kaj ne ekzistas vera solidareco inter la membroŝtatoj.



Flago de la Eŭropa Unio

Tamen, la Nobel-komitato asertis, ke pere de ĉi tiu agnosko, oni premias la Eŭropan Union *"ĉar ĝi helpis transformi Eŭropon de kontinento de milito al kontinento de paco",* elstarigante inter ĝiaj sukcesoj *" la pliigon de la paco, la demokration kaj la homajn rajtojn".*

La monpremion, 8 miljonoj da svedaj kronoj, proksimume 925,000 eŭroj, kiuj Eŭropa Unio ricevis dum solena ceremonio en Oslo (Norvegio) la 10-an de decembro, oni uzos por homaranaj celoj.

Certe, tiu agnosko estas atentigo al la mondo pri la historia kaj aktuala rolo kiun Eŭropa Unio ludis ekde la komenco de la tiam nomataj "Eŭropaj Komunumoj", nome, defendi la pacon en kontinento terure suferanta dum la du mondmilitoj.

La ideo pri unuiĝinta kaj paca eŭropa unio estis la revo de multaj filozofoj, pacemuloj kaj filantropoj, ĉu de la pasinteco, ĉu pli aktualaj kiel Viktor Hugo, Kant, Leibnitz kaj aliaj, sed tiu revo restis disrompita pro la du mondaj militoj okazantaj dum la unua duono de la 20-a jarcento.

Kaj tiel, Eŭropa Unio naskiĝis pere la laboro de iamaj revuloj pri la unueco de Eŭropo, nome Adenauer, De Gasperi, Churchill kaj ĉefe du el ili, Robert Schuman, franca Ministro pri Eksteraj Rilatoj kaj Jean Monnet, komercisto, konsiderataj la veraj "Patroj de Eŭropo", kiuj revis, post la dua mondmilito, krei Komunumon, sub supera aŭtoritato, kiu havu du ĉefajn celojn: unuigi la karbon kaj ŝtalajn minejojn, situantaj inter Francio kaj Germanio kaj samtempe, profitante tion, repacigi tiujn du landojn, kiuj dum 70-jara periodo batalis okaze de tri militoj.



Jean MONNET
1888 - 1979



Robert SCHUMAN
1886 - 1963

Ili tenis sin gvidi la okcidentajn popolojn el Eŭropo al nova erao per la kreado de novaj strukturoj kaj institucioj por gardi la pacon per la komunaj interesoj de la membroŝtatoj kaj per difinitaj konstituciaj traktatoj tiucele:

- Parizo, 1951, per kiu oni kreis la Eŭropan Komunumon pri Karbo kaj Ŝtalo.
- Romo, 1957, oni kreis tiam la Eŭropan Ekonomian Komunumon kaj Eŭroatomon.
- Eŭropa Unueca Akto de 1986, pero kiu oni preparis novan traktaton pri Eŭropa Unio.
- Traktato de Mastriĥto de 1992, stariganta la Traktaton pri Eŭropa Unio (TEU).
- Traktato de Amsterdamo de 1997, kiu modifis la TEU-n.
- Traktato de Nico de 2001, kiu ankaŭ modifis ion kaj preparis la aliĝon de novaj membroj.
- Traktato de Lisbono de 2007, valida ekde 2010. Ĝi estis subskribita post la rifuzo de la Eŭropa Konstitucio.

Pro tio ni parolas pri la graveco de la paco je la Eŭropa Unio.

Naskiĝinta el la ruinoj de la dua mondmilito, ses landoj (Okcidenta Germania Respubliko, Belgio, Francio, Italio, Luksemburgio kaj Nederlando) origine kreis en Parizo, 1951, la *Eŭropan Komunumon pri Karbo kaj Ŝtalo.* Poste, en la jaro 1957 tiuj ses landoj kreis la *Eŭropan Ekonomian Komunumon)* konata ankaŭ kiel *Komuna Merkato* kaj *Eŭratomon,* ĉi tiu lasta por la uzo de la atomenergio por pacaj celoj.

Poste, Eŭropa Unio, traktaton post traktato, alvenis al la Traktato de Lisbono, kiu enhavas pli da eblecojn ol antaŭe favore al paco, demokratio kaj eĉ homaranaj celoj.

Post la falo de la Berlina Murego en 1989, Eŭropa Unio favorigis la reunuiĝon de Germanio kaj daŭrigis la vojon al paco en Eŭropo, pere de la aliĝo de novaj membroŝtatoj el centra kaj orienta Eŭropo, eĉ sudaj landoj kiel Bulgario kaj Rumanio. La Eŭropo de la 21-a jarcento devas alfronti sekurecajn problemojn, kaj por tio la Unio kunlaboras, per ĝiaj eksteraj rilatoj kaj najbareca politiko kun Nordafrikaj, Balkanaj, Kaŭkazaj landoj, Mezoriento kaj Israelo, kaj por la defendo kunlaboras forte kun NATO per vera komuna eŭropa sekureca kaj defenda politiko (KESDP).

Eŭropa Unio sendas al la konfliktemaj areoj *Pacajn Misiojn.* Post la malsukceso atingi pacon en la eksa Jugoslavio kaj konsiderante la sangajn konfliktojn en Afriko, Eŭropa Unio kreis en la jaro 1999 komunan eŭropan sekurecan kaj defendan politikon, ene de la jam ekzistanta komuna ekstera kaj sekureca politiko. La unuajn militistajn misiojn oni sendis en la jaro 2003 al Balkanoj, scenejo de estintaj diplomatiaj malsukcesoj kaj al Demokratia Konga Respubliko.

Tiu Komuna Eŭropa Sekureca kaj Defenda Politiko, funkcianta laŭ la Traktato de Lisbono, ebligas la sendon de militistaj misioj aŭ policaj grupoj al konfliktemaj zonoj, por plibonigi la viv-kondiĉojn kaj sekurecon de la tieaj loĝantoj, labori por forigi tiujn krizojn kaj eĉ restarigi la pacon se eble. Por tiu celo, Eŭropa Unio apogas kaj trejnas lokajn policajn personalojn.

La Traktato de Lisbono fiksas la necesajn normojn kontraŭ la organizita krimo kaj kontraŭ la terorismo, pere de *Eŭropolo*, kreante veran spacon je libereco, sekureco kaj justico, kiu proponas kunlaboron inter la diversaj registaroj de la membroŝtatoj por atingi civitanan liberecon, sekurecon kaj aliron al justico. Aliflance, *Eŭrojusto* stimulas juĝan kunlaboradon inter naciaj juĝistoj kaj policanoj por atingi efikan sekurecon.

Ni ankaŭ devas pritrakti la **helpon al evoluo kaj la homaranan helpon.**

Ekde la komenco, la Eŭropa Komunumo en 1957, per ĝiaj eksteraj rilatoj helpis la evoluon de diversaj popoloj, per diversaj traktatoj, kiam Francio kaj Britio, membroj de la Komunumo, volis daŭrigi siajn ekonomiajn rilatojn kun la kolonioj kaj proponis, kaj ke tiuj transmaraj teritorioj estu asociigitaj al la naskiĝanta Eŭropa Komunumo (EK). En la 60-aj jaroj, la afrikaj kolonioj sendependiĝis sed ili restis sub privilegia situacio, tiel la 20-an de julio 1963, 18 franclingvaj landoj subskribis kun EK la unuan Traktaton de Jaundo por kvinjara periodo, kun la celo havi reciprokajn preferojn, financan kaj teknikan kunlaboradon. En la jaro 1969 oni renovigis tiun traktaton, sed kiam en la jaro 1972 Britio eniris en la EK oni sentis la bezonon inkluzivi la britajn eks-koloniojn kun simila sistemo.

Tiel, la landoj de *Afriko, Karibio kaj Pacifiko* (landoj AKP) decidis alpreni komunan kunlaboradon kun la Eŭropa Komunumo kaj ili subskribis la 28-an de februaro 1975 la unuan Traktaton de Lomeo (Lomeo 1-a) kiu kunligis 46 AKP-landojn al la tiamaj naŭ komunumaj landoj. Oni praktikis sukcese industriajn kaj komercajn rilatojn per STABEX kaj SYSMIN sistemojn (por agrikulturo kaj mineraloj respektive), kaj oni plifortigis la kulturajn kaj sociajn rilatojn. La Traktato de Lomeo atingis la 90-ajn jarojn kaj poste daŭriĝis konstanta dialogo inter Eŭropa Unio kaj diversaj landoj, kun pli da demokratio kaj pli da partopreno de la loĝantaro en decidoj rilataj al la propra evoluo. La nuna Traktato de Lisbono apogas tiun helpon al evoluantaj landoj, per ĝia ekstera agado, kun novaj metodoj pri asocieco.

Tiu evoluo atingis la helpon kontraŭ la malriĉeco, per aliro de nutraĵoj kaj ĉefe trinkebla akvo, sano, edukado, laboro kaj protektado al la Medio, laŭ la Jarmilaj Evoluigaj Celoj de Unuiĝintaj Nacioj. Eŭropa Unio helpas tiun kunlaboron al evoluo kiel ilo por atingi la homajn rajtojn kaj eviti tiel konfliktojn.

Kune kun la helpo al tiu menciita celo, EU konsideras tre grava afero la **homaranan helpon**. En ĉiu krizo, en ĉiu milito, ĉu en Afriko (Darfur, Kongo, Etiopio, ktp), ĉu en Mezoriento (Cisjordanio kaj Gazo)

aŭ post la konsekvencoj de militoj ĉe Libano, Eŭropa Unio daŭris sian homaranan taskon.

Tiu helpo realiĝas pere de speciala organo kreita por tiu celo en la jaro 1992 kaj ekde tiam ĝi laboras en pli ol cent landoj, helpante per bazaj ekipaĵoj al viktimoj de ĉiuspecaj katastrofoj, ĉefe en Afriko. Tiu helpo efektiviĝis en Afganio, Demokratia Konga Respubliko, Srilanko kaj Tanzanio. Sed la Unio daŭre rigardas atenteme la tiel nomatajn "forgesitajn krizojn", kiuj elspezis, nur dum la jaro 2006, la 14% de la homarana buĝeto. Tiel la krizoj de Nepalo, Mjanmao, Tajlando, Ĉeĉenio, Kaĉemiro kaj la amaso da rifuĝintoj kiel tiuj el Okcidenta Saharo ĉe la najbara Alĝerio.

Bedaŭrinde, estas pli kaj pli da rifuĝantoj kaj pro tio Eŭropa Unio, ĉefe per sia komisiono, kunlaboras firme kun Ne-Registaraj Organizoj (NRO) specialigitaj organismoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiel AKNUR kaj Ruĝa Kruco/Ruĝa Krescento por sendi nutraĵojn, trinkeblan akvon, kloaksistemojn, tendojn, medicinajn instalaĵojn kaj provizorajn komunikad-sistemojn.

Antaŭ la grandaj naturaj katastrofoj, kiel la tertremo kaj posta cunamo en Japanio, teruraj sekecoj en Afriko kaj armitaj konfliktoj, Eŭropa Unio, per ĝia homarana respondo, kreskigis la nombron de specialigitaj funkciuloj pri la rapida evaluo de urĝaj bezonoj.

Eŭropa Unio helpas la **demokration.**

La Eŭropa Komunumo ne naskiĝis plene demokratia. Tamen nepre la ŝtatoj kandidatoj al aliĝo devas esti demokratia lando. Baldaŭ, en 1979 okazis la unuaj balotoj al Eŭropa Parlamento per universala voĉdonado, ĉar ĝis tiam estis la diversaj registaroj de la membroŝtatoj kiuj nomumis la eŭroparlamentanojn.

Poste, iom post iom, la ideo pri demokratio kreskis kaj la Eŭropa Kortumo komencis defendi la homajn rajtojn, afero kiu antaŭe ne estis sub ĝia kapableco.

Nuntempe, la Parlamento kundecidas kun la Konsilio rilate la leĝdonajn decidojn, kaj tiel la eŭroparlamentanoj de ni elektitaj ludas pli grandan rolon kej eĉ la naciaj parlamentoj havas okazon kontribui je la decidoj de la Unio.

La Unio, ĉefe post la Traktato de Lisbono, fariĝis pli demokratia kaj travidebla organizo kaj samtempe donas al la eŭropaj civitanoj kaj naciaj parlamentoj pli da informojn kaj pli da iniciatojn. La menciita Traktato de Lisbono starigas klare la celojn de la Eŭropa Unio, nome la pacon, demokration, plenumon de la homaj rajtoj, justicon kaj egalecon, per kontribuo al la protektado de homaj rajtoj, ĉefe de la infanoj, tiel kiel al la respekto kaj disvolvo de la Internacia Juro, speciale de la principoj de Unuiĝintaj Nacioj. La aliĝoj de novaj membroj al la Unio, ĉefe Kroatio, Montenegro, Serbio kaj aliaj kandidatoj, signifas la repacigon en Balkanio kaj la solvon de multaj etnaj konfliktoj en tiu parto de Eŭropo, postulante ĉiam demokratiajn instituciojn.

Sed la Unio devontigas sin defendi la homajn rajtojn kaj la fundamentajn liberecojn, la solidarecon inter membroŝtatoj, la kulturan, lingvan kaj religian diversecojn, por ke ĉio ĉi estos veraj eŭropaj valoroj, ene de la riĉa heredaĵo komuna en Eŭropo. La devizo de la Eŭropa Unio *Unuiĝintaj en diverseco*, montras tion, kaj tenas, ene de globala mondo, la kulturan diversecon kaj tradiciojn de la membroŝtatoj.

En la jaro 2000, en Nico, la membroŝtatoj subskribis la *Ĉarton pri Fundamentaj Rajtoj,* kiu ekde la Traktato de Lisbono estas jure deviga, pro tio la defendo de la homaj rajtoj estas nun esenca kondiĉo por aliĝi al Eŭropa Unio, kaj la membroŝtatoj devas respekti tiujn rajtojn kiam ili aplikos la eŭropunian leĝaron.

La sendo de balotaj observantoj al ĉiu loko de nia planedo por certigi la justajn balotadojn, partoprenas la agadojn de la Unio por la defendo de la homaj rajtoj. Kiel dirite, Eŭropa Unio defendas la

homaranajn celojn, per sociala modelo por ke la plej granda parto de siaj civitanoj estu sekuraj, per prizorgado de homaj rajtoj. Por tio, ankaŭ kreiĝis la *civitaneco de la Unio*, por ke ĉiu civitano de membroŝtato de la Unio sentu sin pli demokratia kaj libera.

La *civitaneco de la Unio* permesas al la civitanoj de la membroŝtatoj de la Unio senti sin pli defendataj interne kaj ekster la limoj de la Unio. Tamen, bedaŭrinde ankoraŭ la eŭropaj civitanoj ne sentas sin verajn civitanojn de la Unio, ĉefe en la nuntempaj krizaj momentoj, kiam ŝajnas, ke ĉiu membroŝtato pledas nur pro la propraj interesoj. Ni esperu, ke la solidareco venkos.

La Komitato de la Nobelpremio pr Paco kaj la internacia komunumo sendis tre gravan mesaĝon al la mondo, nome, ke Eŭropa Unio estas io grava kion oni devas zorgi pro la bono de la eŭropanoj kaj de la mondo, kiel asertis la Prezidanto de la Eŭropa Komisiono, S-ro Durão Barroso. Li ankaŭ asertis, post koni la aljuĝo de la Nobelpremio pri Paco, ke “tiu premio montras, ke eĉ en malfacilaj momentoj, la Unio estas fonto je inspiro por la gvidantoj kaj civitanoj de la mondo, kaj ke la internacia komunumo bezonas fortan Eŭropon”.




Antikva bildo de la
Universitato de Valjadolido
(Hispanio)

# ADVOKATADO EN ANGOLO

## (La sinsekvaj fazoj)

✍ Miguel FARIA DE BASTOS
Advokato en Luando (Angolo)
kaj en Lisbono (Portugalio)

Advokatoj ekzistas kaj profesias en Angolo de antaŭ la dudeka jarcento. Oni povas konsideri en la diakronia fadeno de ĉi-profesio la jenajn ses epokojn aŭ fazojn:

1. Koloniisma fazo.
2. Fazo tuj post la sendependiĝo.
3. Kolektiviĝa fazo (kolektivaj ŝtataj advokatejoj).
4. Reliberaliga fazo (post estingiĝo de la ŝtataj advokatejoj).
5. Fazo liberaligita kun estiĝo de Ordeno de la Advokatoj.
6. Fazo de agnosko de la Ordeno en la Konstitucio kiel "Esenca Institucio de la Justico".

Mia alveno al Luando, ĉefurbo de Angolo, okazis en aprilo de 1966, do dum la koloniisma fazo, kiu daŭris ĝis aprilo de 1974.

Antaŭ la sendependiĝo de Angolo, okazinta la 11-an de novembro 1975-a, profesiis en la ĉefurbo ĉirkaŭ 120 advokatoj; pli-malpli aliaj 30 profesiis en aliaj urboj, ĉefe apudmaraj. El tiuj 120, ĉirkaŭ 40 soldatservis samtempe en la tri malsamaj Armeoj –Tera, Mara kaj Aera-. Mi servis devige en la Aera Armeo dum du jaroj kiel milita subleŭtenanto, sed samtempe, kun permeso de la Aera Armeestro, mi ekadvokatis eniranta en advokatejon de du el la plej prestiĝaj adovkatoj de Luando, Águas Cruz kaj Antero Abreu, ambaŭ ne-hazarde kontraŭkoloniismaj demokratoj. La tiam preskaŭ nekonata nomo "Faria de Bastos" aldoniĝis do al tiuj de ambaŭ. En ĉi-fazo

advokato kondutis sin kiel liberala profesiulo, sed la portugala diktaduro, timanta problemojn por sia koloniisma politiko, tute malhelpis la estigon de Ordeno de Advokatoj en Angolo. La advokatoj tiam, kiel kondiĉo por la plenumado de sia profesio, devis registriĝi kiel advokatoj ĉe la Plej Supera Tribunalo de Angolo tiel submetiĝontaj al al disciplina kompetenteco de la unua-instancaj juĝistoj.

En la 2-a fazo, ekde la sendpendiĝo, la advokatoj en Angolo (komence ne pli ol 10 en la tuta lando), konservis ĉi-statuson dum 6 jaroj kaj ĉirkaŭ 3 monatoj.

La 3-a fazo komenciĝis en februaro de 1982. La Leĝo n-ro 9/82, kopiita de simila leĝo de Kubo, devigis la advokatojn labori ene de kolektivaj ŝtataj Advokatejoj, kontrolitaj de la Nacia Konsilio pri Advokateco, konsistanta el 3 superuloj de la Ministerio pri Justico, unu reprezentanto de la Plej Supera Tribunalo, alia reprezentanto de la Ĉefprokurorejo, 4 reprezentantoj de aliaj tribunaloj, unu advokato, unu popola advokato (advokato ne licenciita pri Juro) kaj unu popola adjunkto de tribunalo. Ĉi Konsilio interalie, superregis la advokatojn sur la disciplina sfero. Advokatoj, de tiam anstataŭ ricevi honorarion kriterie fiksitaj de si mem, ekhavis bazan salajron kun komplemento balanciĝanta de 20% ĝis 90% de tiu bazo, depende de la labor-rezultoj.

La 4-a fazo komenciĝis en 1991, jaro de la Unua Leĝo de Konstitucia Revizio, instrumento per kiu estiĝis oficiale la Demokratia Ŝtato Laŭjura kaj estingiĝis la marksisma-leninisma Ŝtato. La advokateco iĝis tiam denove liberala, ne submetita al la kontrolo de la Ŝtato. Oni devis tamen atendi la kreon de Ordeno de la Advokatoj por taŭga kaj efika funkciado de la advokata profesio.

La 5-a fazo komenciĝis en januaro de 1995, kun la kreo de la Ordeno de la Advokatoj. De tiam, almenaŭ surpapere, la advokatoj kaj ties Ordeno ne plu dependas ĉu de la Ministerio pri Justico, ĉu de la Registaro de la Ŝtato, ĉu de iu ajn estaĵo aŭ organo de la Administracio (la decidoj de la Nacia Konsilio, tamen, estas apelacieblaj ĉe la Plej

Supera Tribunalo de Angolo). La fremdaj advokatoj, tamen, ne estas permesataj advokati en Angolo, escepte se ili tie jam advokatis antaŭe.

La 6-a fazo komenciĝis en februaro de 2010, kiam ekvalidas la aktuala Konstitucio de la Respubliko. Por la unua fojo, ĝuste sur la Konstitucio de la Respubliko, la Ordeno de la Advokatoj estas agnoskata ne nur kiel "Asocio de Publika Juro" (kontraste al la abundaj asocioj de Privata Juro, sen aŭ kun publika utileco), sed ankaŭ laŭlitere kiel "Esenca Institucio de la Justico", samrange kun la Ombudsmanejo. Ĝis tiam, nur la tribunaloj, juĝistoj kaj prokuroroj estis agnoskataj kiel organoj de la aparato de la Justico en la plej entenanta senso.

En la ordena balota periodo de 2011, por la unua fojo, aperis ne unu sola sed du listoj de kandidatoj –A kaj B- por la elekto de la sociaj organoj de la Ordeno por la jartrio 2012-2014. La listo A rifuĝiĝis sub la ombrelo de la altranguloj de la Partio superreganta la landon ekde la sendependiĝo. La listo B siavice sursceniĝis kiel tute neŭtrala sur la politika kaj partia terenoj, konsistanta ĉefe el advokatoj sen ligo al iu ajn Partio, sed ankaŭ kun signifa nombro de advokatoj el tiu Partio superreganta.

Oni agnoskis la venkon de la listo A, sed la anoj de la listo B kontraŭis tiun venkon interalie, pro tio ke la respondeculoj de tiu listo A forgesis resubmeti sian kandidatiĝon ĝis la 23-a de marto 2012-a, tio estas, la limdato ene de la dua kaj definitiva balota kalendaro fiksita de la tiama Nacia Konsilio de la Ordeno de la Advokatoj. Tiu forgeso laŭleĝe, devus nepre rezultigi la agnoskon de la evidente memeksiĝo de la listo A kiel valide konkuranta listo en la kadro de la elektoj. Anstataŭe, la tiama Nacia Konsilio de la Advokatoj prenis decidon refiŝkapti la liston A sen iu laŭjura fundamento tiucele elvokita.

La anoj de la listo B decidis do apelacii kaj ankaŭ interveni per singarda provizora antaŭproceduraĵo kontraŭ tiu neleĝa decido ambaŭokaze ĉe la Plej Supera Tribunalo.

La sola timo de la pledantaj anoj de la listo B estis kaj estas tio, ke tiu apelacio kaj tiu proceduraĵo restu sen procedura antaŭenigo de tiu Tribunalo, tiumaniere, ke estiĝus kaj sukcesus procedura escepto de "postveninta neutileco de la pledo" en la morgaŭa tago de la 31-a de decembro 2014-a, dato de la fino de la nuna ordena mandato, kies konsekvenco estus nepre la juĝa estingiĝo de ambaŭ pledoj kaj la samtempa malvenko de la listo B pro tute antaŭnivdebla procedura malŝanco.

Tiel, aperis la unua krizo ene de la Ordeno kun verŝajna estonta traŭmo por la Ordeno mem kaj verŝajanaj kormefikoj kaj por la morala bildo de la Justico mem kiel tuto. Nur la estonto tamen donos respondon al la koncernaj duboj ĉi-terene.

Nuntempe pli ol 1.000 advokatoj aliĝintaj la Ordenon profesias en la tuta lando, el kiuj eble pli ol 90% en Luando. Fremdaj advokatoj nun profesiantaj en Angolo, ĉiuj portugaloj, estas laŭsciate 5.



Palmo-arboj apud plaĝo en la belega Angolo

# LA GRAVECO ZORGI LA MEDION

✍ **D-ino María Rafaela Urueña Álvarez**
**Hispanio**

Ni ĉiuj devas esti konsciaj pri la grava situacio de la medio, ĉefe dum la lastaj jardekoj. La mondo estas minacata de la industria funkciado, de la amasa konstruado de loĝejoj, ne ĉiam sur la plej taŭgaj lokoj, nocaj gasoj, plastikaĵoj, nigraj tajdoj, kiuj kaŭzas malekvilibran evoluon kaj neelteneblajn situaciojn.

Tamen tiu konscio komenciĝis nur post gravaj poluciaj akcidentoj okazintaj sur la tero, en la riveroj, en la aero kaj en la maroj. Ĉio ĉi kaŭzas fenomenojn kiel damaĝon al la ozontavolo, senarbarigon, klimatŝanĝon, akumuladon de rubaĵoj, perdon de biodiverseco kaj fine ĉi ĉio povas trafi la homan vivon.

Terminologie, la medio estas malfacile difinebla. Oni parolas pri la medio aŭ la homa medio, tamen ne estas eble trovi jurajn tekstojn kun ĝusta difino pri ĉi tiu koncepto, kontraŭe ekzistas multaj dokumentoj kun aludoj al la rilato inter la medio kaj la homoj.

Unesko aprobis la Programon Homo kaj Biosfero *(Man and Biosphere*), uzante la terminon *biosfero* por nomumi la tutan medion. La biosfero estas tiu parto de la tero en kiu koncentriĝas kaj evoluas la vivo. Temas pri fajna tavolo kiu ĉirkaŭas teron, konsistanta el la malaltaj partoj de la atmosfero, la oceanoj, la surfaco de la tero, do tie kie vivo eblas. En la oceanoj, la vivo okazas tie kien eniras lumo, kiu permesas vivi al fitoplanktono kaj zooplanktono kaj eĉ en la marfundo estas vivestaĵoj.

Oni substrekas la devon konservi la interrilaton homo-medio, kiu devas esti ekvilibra por la postvivado de la homaro. En 1996 la

Internacia Kortumo de Justico de Unuiĝintaj Nacioj (UN) asertis, ke *"la medio ne estas abstrakta koncepto, sed la spaco en kiu vivas la homoj kaj de kiu dependas ilia vivkvalito kaj sano, eĉ tiu de la venontaj generacioj"*. En la sama senco, la unua principo de la Deklaracio de Stokholmo en 1972 tekstas jene: *"la homo havas fundamentan rajton ĝui taŭgajn vivkondiĉojn kiuj permesu al li plenumi dignan vivon kaj bonfarton"*.

Ĝuste por tiu celo naskiĝis la t.n. Internacia Juro de la Medio, kun la celo gardi la postvivadon de la homaro, por la nunaj kaj estontaj generacioj. Tiel, la ŝtatoj ne estos la nuraj kiuj devas defendi ĝin, sed ankaŭ la internacia komunumo por ĝia komuna celo. Pro tio, la ŝtatoj, internaciaj organizoj kaj ni mem devas zorgi la sanon de nia planedo je intereso de la tuta homaro.

Profesoro KISS[1] opinias, ke ekzistas du tendencoj rilate la medion: la antropocentrismo, kiu submetas ĉion al la rapida utileco kaj al la ekonomio, favore al la nuna homo, kaj kiu pensas, ke la tero estas sufiĉe ĵusa fenomeno kaj la rimedoj ankoraŭ ne estas elĉerpeblaj. Aliflanke, ni troviĝas la ekocentrismon, nome kontraŭa la antaŭa aserto, ĝi defendas, ke la homo estas parto de la medio kiun li devas gardi kiel tuton. La homo partoprenas la ĝeneralan ekosistemon.

Jam tre bone kaj klare estas difinita la koncepto pri poluado, ĝi ĉiam rilatas al la agado de la homo, rekte aŭ ne rekte, noca por la medio mem aŭ por la diversaj spacoj kiujn ĝi entenas.

Laŭ tio, **kiu devus zorgi la medion?** Kompreneble, tio dependas de la loko kie okazas la poluado. Ĝenerale, se iu rivero aŭ la aero de urbo poluiĝas, la respondeco troviĝas je loka nivelo, sed se tio okazas je pli granda skalo, aŭ oni devas havi ĝeneralan normon por la tuta lando, la ŝtatoj estas tiuj kiuj havas ekskluzivajn kompetentojn sur ĝia tera, mara kaj aera teritorioj.

[1] KISS, A.Ch. kaj BEURIER, J.P. *Droit International de l'environnement.* Pedone, Parizo-2004.

Sed estas kelkaj spacoj de nia planedo kiuj ne estas submetitaj al la jurisdikcio de la ŝtatoj: nome, la Alta maro, oceanaj fundoj, kelkaj internaciigitaj zonoj kiel Antarkto kaj al ekstertera spaco. Tiuj, ne dependantaj de ajna ŝtata jurisdikcio, devas esti protektataj kolektive, kiel komunaj spacoj (*res communis omnium*, laŭ la klasikaj internaciistoj). Vere, apenaŭ estas aŭtoritato por defendi ilin. Nur por la maro, post la konvencio de Jamajko 1982, UN starigis la Aŭtoritaton por la Marfundoj kaj eĉ Maran Kortumon. Tamen, neniu defendas la eksterteran spacon, kvankam vere nek la fiŝoj aŭ la migrantaj birdoj nek la poluado konas landlimojn.

Ankaŭ estas aliaj spacoj submetitaj al la suvereneco de pluraj ŝtatoj, kiam estas elementoj kun komuna ekologia valoro. Ekzemple, la grandaj riveroj kiuj trapasas plurajn landojn, lagoj, arbaroj aŭ ne-anstataŭeblaj ekosistemoj. Por tiuj kazoj oni devas ĉiam kunlabori kaj ĉefe Unesko pledas favore al ilia defendo.

Do, ni konstatas la gravecon de la *translima poluado* kiu estas tiu kiu komenciĝas en difinita lando kaj kies konsekvencojn oni povas sperti tre malproksime, eĉ translandlime[2]. Tiel, okazis maraj gravaj akcidento aŭ tiu de la atomenergia centralo de Ĉernobilo, okazinta en la jaro 1986, kies poluado atingis la duonon de la eŭropaj landoj.

Oni devas antaŭvide eviti poluadon, kaj post iu akcidento, kunlabori por eviti pli da damaĝoj. Por alfronti la transliman poluadon, ne nur la najbaraj ŝtatoj devas subskribi traktatojn, sed ankaŭ la regionoj aŭ komunumoj situantaj ĉe unu aŭ alia flanko de la landlimo, se entute la konstitucio de difinita ŝtato ne malpermesas tion.

[2] Ekzistas internacia konvencio pri atmosfera poluado je longa distanco, subskribita en Ĝenevo la 13-a de novembro 1973-a.

**Historia evoluo de la jura defendo de la medio.**

Oni povas paroli pri la prahistorio de la Internacia Juro de la Medio, en la senco, ke la unuaj normoj, aperintaj komence de la 20-a jarcento, eĉ antaŭ la unua mondmilito, protektis nur la ekosistemojn kiuj havis ekonomian valoron aŭ utilecon. Ekzemple, la Traktato de Parizo de la 19-a de marto 1902 protektis la birdojn utilajn por la agrikulturo; la Konvencio de Vaŝingtono de 1911 ekprotektis la fokojn, utilajn por la peltvendejoj; la Traktato inter Usono kaj Kanado de la jaro 1909 pri protektado kontraŭ la translima poluado de la riveroj, ktp.

La dua etapo, komenciĝas antaŭ la dua mondmilito ĝis la sesdekaj jaroj. La diversaj normoj protektis la naturajn spacojn kaj la biologiajn rimedojn, kiel la Traktato de Londono de 1933 aprobita por konservi la flaŭron kaj faŭnon en Afriko; kaj jam post la dua mondmilito la ŝtatoj eksubskribis multajn traktatojn por eviti diversajn poluadojn. Ekz. Traktato de la Antarkto en 1959, tiu pri la translimaj riveroj, poluadoj per ŝipoj, la Traktato de Moskvo pri atomprovoj en la atmosfero; Traktato de la ekstera spaco de 1967, ktp, krom multaj juĝoj kaj arbitraj decidoj pri tiuj ekologiaj temoj.

La vera ekologia erao komenciĝis je la fino de la sesdekaj jaroj kaj dum la komenco de la sepdekaj. La amasa konsumismo, la problemoj kaŭzitaj pro nafto, kaj grandaj poluadoj aperigis sciencan alarmon kaj novan verdan aŭ ekologian pensmanieron. Tiam, oni subskribis multflankajn regionajn kaj internaciajn traktatojn.

Okazis du gravaj jaroj rilate la defendon de la medio: 1972 kaj 1992. En la jaro 1972, sub la aŭspico de UN, okazis la *Konferenco de Stokholmo pri la Homa Medio,* de la 5-a ĝis la 16-a de junio[3]. En ĝi kunsidis 113 reprezentantoj de ŝtatoj, multaj internaciaj organizoj kaj pli ol 400 neregistaraj organizoj. Ĝi estis fakte la unua tutmonda pintkunsido pri la medio.

[3] Deklaracio de la Konverenco de UN pri la Homa Medio de la 16-a de junio 1972.

La rezulto estis nedevigaj tekstoj kaj rekomendoj. La plej elstara el tiuj tekstoj estis unue, la Deklaracio pri la Homa Medio, kiu enhavas prologon kaj 26 principojn, kiuj kvankam ne devigaj, ili estis kaj estas tre gravaj kaj ĉies akceptitaj. Due, ankaŭ grava estis la agadplano por la medio, enhavanta 109 deklaraciojn por la interŝanĝado de informoj kaj ĉio rilata al la medioprotektado.

Dum tiu sama jaro oni starigis la Programon de UN por la Medio, pere de la Rezolucio 1997 (XXVII), kun administra konsilio kaj sekretario aganta kiel plenuma direktoro. Temas pri organizo de UN, do la financado venas de la ĝenerala buĝeto de la Organizo krom speciala fonduso por la medio.

Ni diras, ke malgraŭ ne devigaj, tiuj tekstoj estis gravaj, ĉar post ili oni subskribis multajn aliajn specifajn traktatojn pri oceanoj, rubaĵoj, atmosfero, dolĉaj akvoj, ktp. Ankaŭ en tiu sama jaro, 1972, ĝuste en oktobro, kunsidis en Parizo la tieaj membroj de la Eŭropa Komunumo, kiuj decidis ekagi per la unua agadprogramo pri la medio, ĉar ĝis tiam ekzistis nenio pri tiu temo en la Eŭropa leĝaro.

La dua esenca dato, kiel dirite, estas 1992. Dudek jarojn post la antaŭa konferenco, Unuiĝintaj Nacioj deziris starigi bilancon, kaj oni alvokis al la *Konferenco pri Medio kaj Evoluo*, ĉi-foje en Rio-de-Ĵaneiro (Brazilo)[4]. Unue Svedio petis esti denove la sidejo de la konferenco, sed UN preferis kunsidi en Brazilo pro la tiea granda biodiverseco, jam sub danĝero. Temis pri la dua tutmonda pintkunsido pri la medio.

La Komisiono de UN pri la Medio iniciatis la preparlaborojn post la publikigo en 1987 de la t.n. *Informo Brundtland*, pri "daŭropova evoluigo". Estis la eksa ĉefministro el Norvegio, S-ino Gro Harlem BRUNDTLAND kiu redaktis dokumenton enhavantan unuafoje la

[4] Deklaracio pri Medio kaj Evoluo de la 14-a de junio 1992-a.

difino de tiu nova esprimo, nuntempe dise uzata[5]. En tiu informo, oni difinas la daŭropovan evoluigon kiel *tiu kiu plenumas la nunajn bezonojn de la homaro, sen limigi la bezonojn de la estontaj generacioj plenumi la siajn.*

Novaj laborkunsidoj okazis de 1990 ĝis 1992, en Najrobio, Ĝenevo kaj Novjorko, kaj la decidojn oni akceptis per interkonsento. Fine, 176 ŝtatoj, 1.200 internaciaj organizoj kaj multaj neregistaraj organizoj kunsidis en la plej multnombra konferenco ĝis nun konata, ĉar eĉ ĉeestis 2.500 ekologiistaj grupoj.

Dum tiuj kunsidoj ne ĉio estis harmonio. La landoj de la Eŭropa Komunumo estis la plej aktivaj kaj defendemaj de la daŭropova evoluigo. Usono ne bone akceptis la decidojn, dum la nordaj landoj el Eŭropo restis kun sendependaj iniciatoj. Kanado, Aŭstralio kaj Nov-zelando starigis propran grupon, kaj Japanio ne volis preni elstaran vidpunkton. Aliflanke, el la evoluantaj landoj, pli ol 137 ŝtatoj, estis sufiĉe aktivaj ĉefe Hindio, Malajzio kaj aliaj, dum la afrikaj landoj defendis nur siajn proprajn interesojn. La eksaj sovetiaj landoj, sendependaj ekde 1990, havis malbonan zorgon rilate la protektadon de la medio kaj ne rolis grave. La rezulto de tiuj kunsidoj estis, tri nedevigaj tekstoj kaj du internaciaj traktatoj.

La Deklaracio de Rio-de-Ĵanejro pri Medio kaj Evoluo konsistas el 27 nedevigaj principoj, kaj enhavas la koncepton pri daŭropova evoluigo kaj la rajto al sana medio por la nunaj kaj estontaj generacioj, la tutmonda solidareco, mildigo de la malriĉeco, solvo de la konfliktojn per pacaj rimedoj kaj la principo 27-a fermas la deklaracion rememorigante, ke *la ekologia paco devas esti ankaŭ jura paco, kaj ke la militoj estas kontraŭaj al la daŭropova evoluigo.*

Ankaŭ oni subskribis dokumenton por la 21-a jarcento sen deviga jura valoro, konata kiel la *Programo 21*. Temas pri dokumento

---

[5] Fina informo de la Tutmonda Komisiono pri Medio kaj Evoluo de UN, 20 marto 1987, sub la titolo "Nia komuna estonteco".

dividita en sekcioj, por agadoj kaj rimedoj por atingi daŭropovan evoluigon.

Devigaj tekstoj estas: **Konvencio pri la klimatŝanĝo** kaj alia pri **Biodiverseco.** Ambaŭ problemoj estas gravegaj, tiel la klimatŝanĝo kiun ni jam suferas kaj kiu kaŭzas al la terglobo kaj al nia propra sano gravajn konsekvencojn, kiel la perdo de biodiverseco, sed nun mi volas paroli al vi pri aliaj eblaj damaĝoj al la medio: la poluado de la akvoj kaj pro la rubaĵoj.

La ***dolĉaj akvoj,*** tio estas: lagoj kaj riveroj, estas damaĝitaj pro tre diversaj poluadoj. Kiam tio okazas en urbo aŭ vilaĝo estas la loka administrado kiu devas prizorgi tion, sed kiam temas pri internacia rivero, trapasanta plurajn landojn, estas jam transnacia problemo[6]. En la plej granda parto de la translimaj riveroj estas starigitaj specialaj komisionoj, kelkaj el ili tre malnovaj, jam ekde la 19-a jarcento, kiel tiuj de la riveroj Danubo kaj Rejno, kiuj traktas tiujn problemojn.

En Hispanio estas landlimaj riveroj al Portugalio (la rivero Minjo, Doŭro, Tejo kaj Gvadjano). Mi loĝas en regiono Kastilio kie la rivero Doŭro fluas apud la landlimo de nordo suden. De ĉiam la problemo pri la uzo de tiuj riveroj kaŭzis kelkajn problemojn, solvitaj pere de diversaj traktatoj inter Portugalio kaj Hispanio kaj lastatempe, ankaŭ per interregionaj interkonsentoj.

Pli videbla estas kutime la ***poluado de la maroj***, plej ofte pro poluantaj akcidentoj, sed ankaŭ pro intencaj verŝaĵoj, aŭ eĉ pro la normala uzo de la maroj. Ni devas rememori, ke en la maro evoluas ĉiu mara specio, kaj la bazo de la mara vivo estas la fitoplanktono, la zooplanktono kaj la bakterioj. Necesaj estas ĉi tri elementoj por la mara vivo: lumo aŭ fotosintezo; saleco kaj temperaturo sed ankaŭ oksigeno, nitrogeno, fosforo, ktp. La maraj fluoj estas esencaj por movi la akvojn ekde la fundo en la surfacon kreante pli da planktono. La

[6] Traktato pri la rajto uzi la internaciajn riverfluojn por aliaj celoj ol la navigado de la 21-a de majo 1997-a.

nutra ĉeno de la fiŝoj ekde la fito- kaj la zooplanktono, atingas fine la homon, kiu manĝas fiŝojn[7]. Pro tio la poluado de la maroj etas tiel grava.

La plej videbla el la maraj poluadoj estas tiu kaŭzata de la hidrokarbidoj kiuj damaĝas ne nur la maran faŭnon sed ankaŭ la maran flaŭron. Ni ĉiuj memoras pri la gravaj akcidentoj kaŭzitaj de grandaj petrolŝipoj kiuj ĉiutage transiras la marojn kiel *Torrey Canyon,* en 1967[8], kiu estis la unua alarma signalo, poste *Erika, Prestige,* ktp. Tiu polucio mortigas la fiŝojn ĝenerale pro manko da oksigeno, ĉar la nigra tavolo sur la surfaco malpermesas la eniro de oksigeno kaj lumo, kaj la marajn birdojn pro malvarmo, ĉar la plumaro estas trempita de petrolo kaj perdas sian varmigan funkcion.

Ankaŭ oni povas polui la marojn pro hidrokarbidoj, pere de la lavado de la balastaj rezervujoj de la petrolŝipoj, kvankam tiu tasko devas esti farata en la havenoj. Tamen por ne pagi kaj ne atendi longdaŭran vicon, ktp, tre ofte la maristoj lavas tiujn rezervujojn kun petrolrestaĵoj, verŝante ĝin rekte en la maron.

Ankaŭ povas okazi poluado kiel rezulto de la ekspluatado aŭ esplorado de la mara subgrundo, kiel ĉi-jare okazis, en la meksikia Golfo, pro akcidento en petrolstrukturo situanta sur la kontinenta breto aŭ en alta maro. Se al tio ni aldonas intencajn kemiajn kaj alispecajn ŝutaĵojn kaj la bakteriologian poluadon kaŭzata de la urbaj rubaĵoj, ni havos kompletan panoramon de la febleco kaj danĝero de la maraj akvoj.

Kompreneble, mi ne volas tedi vin kun la rakonto de traktatoj ekzistantaj por ĉiu okazo, kiuj estas multaj kaj tre variaj. Pro tio, mi preferas klarigi, ke por defendi la maron, estis tri universalaj konferencoj, la plej grava la Tria, kiu finiĝis per la *Konvencio de UN*

[7] AUBERT, M, *El cultivo del oceano*. Labor. Barcelona, 1968.

[8] QUENEUDEC, J.P. *L'incidence de l'affaire du Torrey Canyon sur le droit de la mer*. Annuaire Français de Droit International, p. 701.

*pri Juro de la Maro*, de Montego Bay (Jamajko) en la jaro 1982[9], kiu traktas ĉiajn poluadojn.

Laŭleĝe, ŝirmi la maran medion dependas de la zono en kiu la poluado okazis. La ŝtatoj havas aŭtoritaton pri sia propra teritoria maro, t.e. dekdu mejloj ekde la marbordo, kaj en sia ekonomia ekskluziva zono, ĝis 200 maraj mejloj. En alta maro ĉiuj devas zorgi la medion, ĉar tiuj akvoj estas liberaj kaj uzotaj de ĉiuj, ĉu por navigado, ĉu por fiŝkaptado. Fine, la plej subaj oceanaj fundoj, kie jam ne estas vivantaj estaĵoj, sed ekonomie tre gravaj pro la mineraloj, estis agnoskitaj en la Konvencio de Jamajko kiel *komuna heredaĵo de la Homaro*, starigante specialan aŭtoritaton kaj kortumon[10] por ŝirmi ĝin kaj reguligi ĝian ekspluatadon.

Multaj aliaj poluadoj estas, tiuj kemiaj, pro plastikaĵoj, pro piloj aŭ baterioj (tiuj lastaj devas esti metitaj en speciala ujo), pro nocaj gasoj aŭ per aliaj rubaĵoj.

**Rubaĵo** estas ĉiuspeca foruzita, rompita objekto, senvaloriĝinta materialo, urbaj kaj industriaj defalaĵoj, forigendaj el la homa kaj industria medioj. Tiuj materialoj povas kaŭzi nocojn al la medio kaj al la homoj, ĉar la ĉiutaga vivo kaj ekonomia agado de la homo produktas gravajn defalaĵojn solidajn, fluidajn kaj gasajn, eĉ radioaktivajn atomrubaĵojn.

Pro tio, oni rekomendas redukti, reuzi kaj recirkuligi la rubaĵojn (temas pri la 3 R-oj).

Malfavoraj konsekvencoj de la defalaĵoj skizas jene: la rubaĵo estas infekto-disvastiganto, per ĝiaj mikroorganismo kiuj kaŭzas

---

[9] Tria Konfereneco pri Juro de la Maro. Traktato de Montego Bay, 10-a de decembro 1982 (A. Conf. 62/122).

[10] Statuto de la Internacia Kortumo pri Juro de la Maro, 10-a de decembro 1982-a kaj ĝia Reglamento de la 28-a de oktobro 1997-a. La Kortumo havas kiel sidejoj Hamburgo (Germanio).

malsanojn; plimultigas la insektojn, malpurigas la grundojn kaj la aeron, malbeligas la estetikan pejzaĝon, ktp.

Pro tio, la sendanĝerigo troviĝas en la nunaj sistemoj de aranĝoj, kies celo estas la transformado de la danĝeraj materialoj je neŭtralaj. Ekde la komenco de la organizita rubaĵtraktado en homaj loĝlokoj ĝis la nuna tempo, elformiĝis tre larĝa skalo de sendanĝerigaj metodoj, ĉefe en la evoluintaj landoj, kiuj redonas la rubaĵiĝintajn materialojn al la medio kaj reutiligas ilin. Komporeneble, kiam en antaŭaj tempoj, la homaro ankoraŭ uzis kaj reuzis la naturajn rubaĵojn, la naturo povis tiujn akcepti sen malfavoraj konsekvencojn. Sed la apero de artefaritaj materialoj kaj plilaboritaj produktaĵoj, kune kun la grandaj kaj amasaj loĝlokoj, alportis novajn problemojn, nome: la naturo ne plu povas toleri la ŝarĝadon kaj ne povas perfekte regeneri sin. Se al tio ni aldonas la naciajn kaj internaciajn pli severajn leĝojn, pro ekonomiaj kialoj komencis elformiĝi novaj procezoj por rubaĵsendanĝerigo, kies celo estas ankaŭ iu utiligo de la rubaĵoj.

La reuzado komenciĝas per la kolekta metodo en fermataj rubujoj, kutime diverskoloraj por ĉiu forĵetaĵo, situantaj en centraj lokoj de la urboj kaj vilaĝoj, kie oni metas la rubvazojn aŭ plastsakojn. Tiu rubaĵkolektado estas sufiĉe higiena. Poste, diversaj urbomastrumadaj entreprenoj kolektas la rubaĵojn kaj demetas ilin en konvenajn lokojn. Ofte, la demetitaj rubaĵoj estas kompaktigataj antaŭ sia reutiligo, ekzemple: papero, kartonoj, vitroj, ktp. En multaj okazoj, antaŭ la vendado de la preta produktaĵo oni faras postselektadon, apartigon de restaĵoj (betono, porcelano, ŝtonoj, vitro) por plibonigi la rezulton. Ofte, oni bruligas la rubaĵojn. Tiu metodo havas avantaĝojn por la ekonomio, la incineratoro povas esti ene de la urbo, ktp, sed ankaŭ malavantaĝojn, kiel la altaj investkostoj, perturboj por la aero, ktp. Aliaj sistemoj estas la pirolizo, pervarma malkomponado de la rubaĵoj en fermataj sistemoj kaj la hidrogenizado. Fine, la recirkuligo de la materialoj rezultigas gravan ŝparadon, ĉar la rubaĵoj enhavas multe da denove utiligeblaj materialoj.

La agrikulturaj defalaĵoj, urbaj rubaĵoj, kloakakvoŝlimoj, ktp kapablas produkti biogason, per plilaborado de organikaj sterkaĵoj, kiel reuzada metodo. Oni povas uzi subĉielan metodon, kiu daŭras longa tempo, aŭ fermantan sistemon. En Ĉinio kaj Hindio jam ekde la 60-aj jaroj komenciĝis forta disvastigo de la uzo de apuddomaj malgrandaj biogasproduktiloj por kovri la bezonojn de energio de la unuopaj mastrumoj, surbaze de kuirejaj kaj ĝardenaj defalaĵoj. La nombro de tiaj instalaĵoj atingis jam 5 milionojn en Ĉinio kaj 2 milionojn en Hindio. En Eŭropo eĉ komence de la 80-aj jaroj, funkciis apenaŭ kelkaj miloj da similaj sistemoj, sed kun eksperimenta karaktero aŭ eksperimentemaj privatuloj[11].

Do, ni konstatas, ke eblas reuzi preskaŭ ĉion.

Plej malfacile estas malaperigi la atomenergiajn rubaĵojn. Nuntempe, la radioaktivaj rubaĵoj, ĉefe tiuj de longdaŭra aktiveco, estas vera prokrasta bombo kiun ni postlasas al la venontaj generacioj. Tiuj rubaĵoj estas konsekvenco de la procesorado de la karburaĵo en la atomenergiaj reaktoroj. Oni konsideras ilin je malgranda, duongranda kaj granda aktiveco. La unuaj havas malgrandajn niveloj de radioaktiveco, kaj kutime oni gardas ilin en surfacaj ujoj. Ekzemple, estas tiuj produktataj en hospitaloj, industrio, papero, vestaĵoj en kontakto kun malgranda radiado. Tiuj, pri duona aktiveco kutime oni solidiĝas en betono aŭ gudro antaŭ ĝia forigo, aŭ oni enmetas en la atomenergiajn vrakejojn. La plej tiklaj estas la atomenergiaj restaĵoj de granda aktiveco.

Ni povas rememori, ke antaŭ jaroj, ĉefe en la 50-aj kaj 60-aj jaroj, oni ekŝutis ilin rekte al la maro, ĝuste en la submarajn fosojn, kiel tiu Atlantika, ene de hermetikaj rezervujoj aŭ cisternoj, laŭ ideo ke tiel ne eblus korodo. Tamen, lastatempe *Greenpeace* filmis tiujn supozeble hermetikajn ujojn kaj ilil konstatis la komencon de korodo kiu ekrompas iliajn kovraĵojn. Tio estas tre grava kaj vere oni ne scias

[11] MOLNAR, F. *Apliko de modernaj rubaĵsendanĝerigaj metodoj kaj la medioprotektado*, ĉe http://freeweb.hu/eventoj/stb/industrio/rubaĵo/rubaĵo.htm (1984).

kion fari. Estis malpermesata plu ĵeti en la maron tiujn atomenergiajn restaĵojn, sed ĉiuj estas certaj, ke tiu noca agado daŭras en alta maro.

La Internacia Organizo pri Atomenergio estas kompetenta konsili pri la taŭgaj ejoj kie oni povas ŝuti tiujn atomrestaĵojn, estante ĉiam malpermesata la ŝutado de atomenergiaj defalaĵoj de granda aktiveco[12].

Internacie estas gravaj traktatoj pri la kontrolo de translimaj transportoj de danĝeraj rubaĵoj, kiuj estas kontrolataj per la Traktato de Baselo de 1989 kaj por eviti ilian transporton al Afriko oni subskribis la Konvencion de Bamako (Malio) de 1991[13]. Ankaŭ en 1995 oni subskribis la Konvencion de Waigan por malpermesi la importadon en la landojn de la regiono de Suda Pacifiko, de danĝeraj kaj atomenergiaj rubaĵoj kaj bone kontroli ilin.

La Traktato de Baselo estas la ĉefa teksto, kiu enhavas la normojn pri transportado, la devigan permeson de la importa kaj eksportaj ŝtatoj, ktp dum la aliaj konvencioj estas regionaj.

Fine, ni parolos iomete pri la **protektado de la medio en la Eŭropa Komunumo.**

Kompreneble, la originaj traktatoj, nome, la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo (1951) kaj la Traktato pri la fondo de Eŭropa Ekonomia Komunumo kaj tiu pri Atomenergio (1957), enhavis nenion pri medioprotektado, ĉar en tiu momento neniu zorgis pri tio.

En la jaro 1972, la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EK) partoprenis la Konferencon pri la Homa Medio en Stokholmo, kaj en

---

[12] Aneksoj pri la Internacia Organizo pri Atomenergio al la Traktato de London de la 29-a de decembro 1972-a. Vidu: YTURRIAGA BARBERAN, J.A. “Aspectos Jurídicos de la eliminación de residuos radioactivos en el mar en Problemas Internacionales del Medio Ambiente”. Universidad Autónoma de Barcelona. Barcelona – 1985.

[13] Traktato de Bamako 1991, pri la malpermeso importi en Afrikon kaj pri la kontrolo de translimaj transportoj de danĝeraj rubaĵoj en Afriko. Traktato de Baselo de la 22-a de marto 1989-a, pri kontrolo de translimaj movadoj de danĝeraj rubaĵoj, kaj ĝia forigo.

oktobro de tiu sama jaro en Parizo, okazis la Pintkunsido de Ŝtatestroj kaj Registarestroj, ekde tiam oni celis novajn objektivojn pri medioprotektado. Tiel, komenciĝis serio da programoj pri medio, la unua de 22-a de novembro 1973, kun ĝeneralaj celoj kaj pensante jam pri internacia kunlaboro. Sed, kompreneble, fakte ne estis sur la traktatoj artikolo por protekti la medion, do, ili uzis la artikolojn pli proksimaj por tiu celo, kaj ĉefe la tiaman artikolon 235-an, kiu permesis agi al la Komunumo, kiam estos necese plenumi difinitan celon, kvankam la traktato silentas.

Sekvis dua, tria kaj kvara programoj, ĝis la jaro 1992, grava dato, ĉar la Traktato de Mastriĥto kreis la Eŭropan Union kaj samtempe ĝi agnoskas kiel objektivon la "politikon pri Medioprotektado". Jam estis vera komunuma politiko, ne ekskluziva, sed komuna kun la membroŝtatoj. La 5-an programon pri Medioprotektado oni aprobis la 15-an de decembro 1992-a, celanta ankaŭ la helpon al la ne-evoluintaj landoj. Tiu Programo havas tre interesan titolon, nome *"Politiko pri Medioprotektado kaj daŭropova evoluo, kiu respektos la medion",* kaj ĝi ekmarŝis laŭ la tendencoj de la Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo de Rio-de-Ĵanejro 1992. La difino "daŭropova evoluo", naskiĝinta en Rio-de-Ĵanejro, estas ene de tiu programo kaj la sekvontaj.

Fine, ankoraŭ ni estas en la sesa Programo pri medioprotektado, titolita ĉi-foje *"la estonto estas je niaj manoj",* en kiu oni substrekas la bezonon agi je ĉiu nivelo: nacie, regione kaj internacie. Ĝi memorigas la bezonon zorgi pri la klimato, la biodiverseco, la rilato inter medio kaj sano kaj la limigo de la rubaĵoj. Fine, oni asertas, ke la protektado de la medio integriĝos ene de la aliaj komunumaj politikoj.

La sekvantaj traktatoj de EU, nome Nico, Amsterdamo kaj la lasta en Lisbono, same aplikas tiujn celojn.

Sed kiel funcias Eŭropa Unio tiucele? EU estas subjekto de Internacia Juro kaj ĝi havas la rajton subskribi traktatojn kaj aliĝi al ili.

Kutime, EU, kiel antaŭe la Eŭropa Komunumo subskribas kaj aliĝas al jam ekzistantaj konvencioj pri protektado de ĉiu difinita spaco. Tiam tiuj subskribitaj konvencioj estas rekte aplikeblaj al la membroŝtatoj. Tiu principio de la superrego de la Eŭropunia kaj Komunuma jro sur la membroŝtatoj estis ĉiam asertita de la Justica Kortumo de Eŭropa Unio.

Sed la membroŝtatoj devas apliki tiun leĝaron, kaj pro tio la Eŭropa Komunumo kaj nun la Eŭropa Unio uzas kutime Direktivojn. La eŭropunia derivita juro konsistas ĉefe el Reglamentoj, Direktivoj kaj Decidoj. La reglamenton oni uzas por ĝeneralaj celoj kaj por ĉiu lando de EU. Kompreneble, Reglamento estas tro ampleksa por fiksi al iu difinita membroŝtato normojn kiam okazis poluado de la aero, de la maro aŭ alia problemo. Oni kutime uzas la Direktivojn, kiuj estas adresitaj al difinita ŝtato kiu devas plenumi la celon de la normo, uzante la rimedojn kiujn la ŝtato konsiderus plej efikaj. Do, estas normo por plenumi libermaniere la celon. Ne gravas kiu aŭtoritato plenumos ĝin, sed ĉiam devas esti rekte aplikata pro la superrego de la eŭropunia juro.

Do, tra ĉiu internacia leĝo pri la medio, ni konstatas, ke ni troviĝas antaŭ ne-forta juro, plena de konferencoj jure ne-devigaj, de rekomendoj, eblecoj, sed malmultaj devigaj tesktoj, escepte de la internaciaj traktatoj kaj la leĝaro de la Eŭropa Unio. Kaj tamen ni defendas la klimaton kaj la biosferon, esencaj esprimoj de la Komuna Heredaĵo de la Homaro. Do, ni havas gravan respondencon por la defendo de kolektivaj ekologiaj interesoj, kiujn oni devas defendi por la tuta homaro. Sed la demando ĉiam restas la sama. Kiu povas protekti la homaron kaj ĝian ekologian heredaĵon?

La plej granda parto de internaciistoj pensas je Unuiĝintaj Nacioj. Sed la Ĉarton de la Organizo oni subskribis en la jaro 1945, kaj tiam ne ekzistis zorgoj pri nia temo, do ĝiaj instrumentoj aŭ organoj ne respondas al tiu celo. Kiu do zorgos, ĉu la Ĝenerala Asembleo? Ĉu la Konsilio pri Sekureco? Tiu ĉi lasta nur agos kiam estos en danĝero la paco kaj la internacia sekureco. Kaj certe tio povas okazi, ekzemple, pro gasaj emanadoj aŭ manko de akvo en la mondo, kiam pli ol mil

milionoj da personoj ne havos aliron al akvo. Tio jam kaŭzas internaciajn konfliktojn, kaj oni bedaŭrinde atendas pli.

Jam en la jaro 1992 la tiama prezidanto de la Konsilio pri Sekureco asertis, ke la ne-estabileco en la ekologia sfero jam estas minaco al la paco kaj internacia sekureco. Vere ne estas banala afero pripensi la rilaton inter tiuj celoj de la 1-a artikolo de la Ĉarto de UN, t.e. la defendo de la internacia sekureco kaj la venontaj ekologiaj konfliktoj kiujn povas kaŭzi la diversaj mediaj problemoj. En tiuj okazoj certe devas agi la Sekureca Konsilio de UN.

Ĝis nun, estas ĝenerale akceptita la rajto de la ŝtatoj enmiksiĝi favore al la defendo de komunaj ekologiaj interesoj, tio estas, la "rajto je ekologia enmiksiĝo" eĉ en alta maro, se estas grava polua akcidento. Kiam iu internacia aŭtoritato aŭ organo havos tiun saman rajton?

Same, multaj pledas pro speciala kortumo por la Medio, ĝis nun ne ekzistanta.

S-ro Klaus Töpfer, membro de la Programo de UN por la Medio, rimarkante la rilanton inter medio, malriĉeco kaj sekureco kaj paco, pledis pro la kreo de "verdaj kaskuloj", dirante, ke li ne postulas de UN blukaskuloj por la konfliktaj ekologiaj situacioj, sed verdajn kaskulojn kiuj helpos je tiuj situacioj, purigante kaj riparante la damaĝojn de la medio[14].

Nuntempe, oni observas praktike la konscion pri la medioprotektado en ĉiu laboro de UN. La aktiva kunlaboro inter tiu ĉi Organizo, la registaroj, la neregistaraj organizoj, la scienca komunumo, kaj la privataj sektoroj aperigas novajn sciencajn konojn kaj konkretajn agadojn por solvi la ekologiajn problemojn.

---

[14] "Verdaj kaskuloj por la mondo" estas humaniga organizo kreita de la germana ekologiisto Rupert Neudeck kun la celo helpi la rekonstruado de loĝejoj en konfliktoj, kiel tiuj de Irako, Afganio, Ĉeĉenio aŭ Bosnio, kaj volas prezenti ĝin, en tiuj okazoj, ankaŭ kiel forumo por dialogo inter kristanoj kaj islamoj. Ĝi kunlaboras kun la Programo de UN por la Medio.

UN jam konsideras, ke protekti la medion devas esti parto de ĉiu agado pri socia kaj ekonomia evoluo.

Kiel asertas la Ĉarto de la Tero, ni devas kuniĝi por krei daŭropovan mondan socion baziĝantan sur respekto kaj estimo al la naturo, sur universalaj homaj rajtoj, sur justeco kaj sur kulturo de paco. Pro tio, survoje al tiu celo estas necese ke ni, popoloj de la Tero, transprenu respondencon pri la nunaj mediaj problemoj kaj por tiuj de la estontaj generacioj.

Ni estas civitanoj de diversaj nacioj sed de unusola mondo, en kiu interplektiĝas lokaj kaj terglobaj aferoj. Sed se ni ne protektas la medion, ni ne lasos al la venontaj generacioj mondon kie estos realigata la daŭropova evoluigo.



*Ollin Tonatiuhtlan* en la nahuatla lingvo "Moviĝanta Suno"
Azteka Kalendaro (Meksikio)
Prosimume 1479.

# Kazo C-566/10 P ĉe la Kortumo (Granda ĉambro) de EU, *Italio kontraŭ la Komisiono*
### *La 27-an de novembro 2012*

En tiu proceso, Italio apelaciis kontraŭ antaŭa juĝo de la Tribunalo de la 13-a de septembro 2010, kiu pravigis la Komisionon en proceso (T-166/07) per kiu la Itala Respubliko estis klopodinta nuligi tri dungokonkursojn de EPSO (la personar-selekta oficejo de EU, kiu laboras sub kontrolo de la Komisiono) kies plena alvoko estis publikigita nur en tri el la oficialaj lingvoj de EU kaj kiuj postulis de la kandidatoj la scipovon de unu el tiuj lingvoj.  Nome temis pri la angla, la franca kaj la germana lingvoj.  La konkursoj estis EPSO/AD/94/07, EPSO/AS/37/07 kaj EPSO/AD/95/07.

La Helena Respubliko kaj la Litova Respubliko intervenis en la proceson subtene al Italio. La Kortumo pravigis Italion kaj nuligis la atakitajn konkursalvokojn, sed ankaŭ diris ke la jam atingitaj rezultoj de la konkursoj ne esas tuŝendaj.


Se temas pri la publikigo de la konkursalvokoj en limigita nombro da lingvoj, la Komisiono defendis la praktikon de EPSO dirante ke tiu lingve limigita publikigado estis necesa pro la kresko de la laborkvanto okaze de la aliĝo de novaj membroŝtatoj al EU dum la jaroj 2004 kaj 2007 kaj ĉefe pro la plimultiĝo de la oficialj lingvoj, dum EPSO ne havis sufiĉan tradukkapablon.

La Kortumo tamen rekonis ke tia lingve limigita publikigpraktiko ne estis ligita kun la aliĝoj, ĉar ĝi daŭris plu, kaj ĉar la konkursaj alvokoj estas parte ripetaj tekstoj kies tradukado ne estas nepra obstaklo.  Cetere, ĉiukaze praktikaj problemoj pri tradukado devas esti komparataj kun la rajto de ĉiuj civitanoj de la Unio informiĝi pri la konkursoj laŭ la samaj kondiĉoj.

Se temas pri la postulo ke ĉiuj kandidatoj scipovu almenaŭ la anglan, la francan aŭ la germanan, kaj la decido ke la fremdlinga parto de la ekzamenoj okazu en unu el tiuj tri lingvoj nur, la Kortumo agnoskis ke konkursaj alvokoj povas prave postuli la scipovon de iuj lingvoj, se tio estas necese por la posteno pri kiu temas. Tamen la juĝisto devas povi kontroli la pravecon de tia postulo, sed en tiuj tri alvokoj mankis ĉia klarigo pri tia neceso. Do la Tribunalo malprave agnoskis tute glate ke "estas klare ke" tiuj tri lingvoj estis bezonataj pro administraj kialoj.

La Kortumo do nuligis la antaŭan juĝon de la Tribunalo kaj decidis ne resendi la kazon al la Tribunalo sed mem findecidi pri ĝi, nuligante la tri konkursajn alvokojn pro tio ke ili malrespektas

- Artikolon 1, paragrafo 2, de la aldonaĵo III de la Statuto de la personar de EU, ligite kun artikolo 5 de la reglamento n-ro 1 (pri la lingvoj de EU), kaj
- la principon de ne-diskriminacio pro lingvo, proklamitan en la artikolo 1 kvine de la Statuto de la personaro.



Araba Moskeo en Kordovo (Hispanio)
Jaro de la ekkonstruo786 p-K.

# JURAJ VORTOJ

## *Alimento*

La rajto je alimento estas la devo liveri al parenco aŭ boparenco, la viv-rimedojn necesajn al ties situacio. Temas pri la efektivigo de la rajto pri asistado kies ĉiu homo posedas pro dependenco dum la naskiĝo kaj ĝis fiksita aĝo, aŭ pro manko de viv-rimedojn dum la matura aĝo aŭ pro ne-kapableco (mensa aŭ korpa). Historie, oni konsideris ke ĉi tiu rajto naskiĝis ĉefe por asisti al nelegitimaj infanoj aŭ al senkulpe divorcigita edzino. Tamen, la superado de ĉi tiuj antikvaj konceptoj (nelegitima idaro aŭ kulpa divorco) en preskaŭ ĉiuj naciaj leĝaroj, fariĝis, ke tiuj kiuj rajtas peti ĉi tiun rajtoj estas jenaj:

- La edz(in)o.
- La idaro, sendepende de la rilato de la gepatroj, t.e. ĉu leĝe geedziĝitaj aŭ ne.
- La gepatroj, ĉu naturaj aŭ adoptaj.
- La gefratoj.

En kelkaj naciaj leĝaroj ankaŭ rajtas je alimento tiuj kiuj realigis sufiĉe altan mon-donacon, rilate la ricevinton de tiu donaco. Ankaŭ, kiel dirite, la edz(ino) kiu divorciĝis senkulpe, t.e ŝi/li ne estis la kaŭzo de tiu divorco.

La enhavo de ĉi tiu rajto je alimento baziĝas sur la kontentigo de la plej bazaj homaj bezonoj, tio estas: nutrado, edukado, saneco, transporto, vestado, ktp, do, malgraŭ la nomo ne nur rilatas al la bezono manĝi. La devigito estas la homo kiu devas provizi tiujn bezonojn, ekzemple: la gepatroj rilate la junajn gefilojn; la idaro rilate la gepatrojn ne posedantaj sufiĉajn viv-rimedojn; la patro rilate sian idon naskiĝintan ekstere de leĝa geedziĝo, ktp.

Esence estas du la kondiĉoj nepraj por agnoski ĉi tiun rajton:

- Homo ne povas provizi siajn plej bazajn viv-bezonojn.
- Direkta familiano (gepatroj, filoj…) sufiĉe povas provizi la viv-bezonojn de tiu familiano.

**Vortoj rilataj al "rajto je alimento":**

- Provizora aliment-kompenso: temas pri la sumo periode pagata al parenco, ekzemple al filo, dum la tempo kiam daŭriĝas la proceso kaj ĝis la ekzisto de definitiva juĝo. La provizora aliment-kompenso estas fiksata per akto de la juĝisto.
- Definitiva aliment-kompenso: tiu sumo fiksita per juĝo kaj kiu estas periode pagata al parenco. Kompreneble, ĝi estas fiksita de la juĝisto post konsideri la rimedojn de la homo kiu havas la devon provizi per alimento kaj la bezonojn de la homo kiu rajtas ricevi ĝin.

  Kutime, la alimento-kompenso daŭriĝas ĝis konkreta dato, ekzemple ĝis kiam la filo atingas la 18-an vivojaron aŭ ĝis kiam li/ŝi finas siajn studojn, ktp. La alimento-kompenso ankaŭ povas esti porĉiama, ekzemple, la devo de la gepatroj rilate idon mense malkapablan por disponi pri la plej elementaj vivrimedoj.
- Alimentanto: homo devigita realigi la alimento-kompenson.
- Alimentato: homo kiu rajtas ricevi la alimento-kompenson.

# JURAJ INFORMOJ

## § NE EBLAS LA "RAJTO JE FORGESADO"

La pasintan monaton junio la Kortumo de UE decidis pravigi al la usona entrepreno Guglo kontraŭ la Hispana Registaro rilate la rajton je forgesado. La Prepara Raporto de la Ĝenerala Advokato de la Kortumo, Nilo Jääskinen, konsideras, ke "*la interretaj entreprenoj kiel Guglo ne respondecas pri la personaj datumoj aperantaj sur la paĝoj de ĝi prezentataj post serĉado"*. La fina juĝo aperos post kelkaj monatoj ĉar tiu raporto ankoraŭ estas provizora.

En la jaro 2010 la Hispana Agenco pri Personaj Privataj Datumoj petis al Guglo forviŝi la rezultojn atingitajn post interreta serĉado, kiam ili aludis hispanan civitanon kiu jam pagis siajn impostajn ŝuldojn, tamen tiuj antikvaj paĝoj ankoraŭ konsideris lin kiel ŝuldanton. Laŭ tiuj antikvaj paĝoj, datumitaj en la jaro 1998, tiu hispana civitano ŝuldis kvanton da mono, sed finfine li pagis la ŝuldon, tamen tiuj paĝoj, kie aperis tiutempaj datumoj, ankoraŭ prezentis lin kiel impost-ŝuldanton kaj Guglo aperigis tiujn paĝojn se oni petis informon pri ĉio rilata al tiu civitano.

La provizora juĝo asertas, ke Guglo ne respondecas pri la enhavo de la TTT-paĝoj de ĝi prezentataj post serĉado, do, ne eblas la rajto je definitiva forgeso. Laŭ la juĝo, kiel dirite ankoraŭ provizora, nacia agenco celanta la defendon de privataj datumoj ne rajtas peti al la interreta entrepreno forviŝi tiujn datumojn, ne regatajn de ĝi sed de la mastrumantoj de la TTT-paĝoj, krome tio estus enmiksiĝo en la rajto je libera esprimado.

## § GRAVA JUĜO RILATA AL LA PATENTO DE HOMAJ GENOJ.

La pasintan 13an de junio la Supera Kortumo de Usono decidis nuligi la eblon patenti homajn genojn. Laŭ la juĝo *" fragmento de DNA (desoksiribonukleata acido) estas natura produktaĵo, do ne eblas patenti ĝin nur pro la fakto, ke ĝi estis apartigita"*. Nuligas, ĉi tiel, la plendo de la entrepreno Myriad Genetics rilate la genojn BRCA1 kaj BRCA2, aperantaj ĉe la mam- kaj ovari-kanceroj. Tiuj eblaj patentoj havigis al tiu entrepreno la "ekskluzivan rajton" diagnozi la ĉeeston aŭ malĉeeston de tiuj genoj. Tuj post koni la juĝon, Mary-Claire King, sciencistino eltrovinta en la jaro 1990 la rilaton inter la geno BRCA1 kaj tiuj kanceroj, deklaris, ke temis pri pozitiva rezulto por la virinoj suferantaj tiujn malsanojn kaj ankaŭ por la kuracistoj, la sciencistoj kaj por la komuna saĝo.

Krome, oni malfermas la eblon esplori kaj plibonigi la diagnozojn, ĉar aliaj entreprenoj jam pripensis perfektigi la manieron serĉi tiujn genojn en la virinojn, antaŭe tio ne eblis, pro la fakto, ke almenaŭ laŭleĝe la genoj "apartenis" al Myriad Genetics.

Tamen ekzistas ankoraŭ kelkaj problemoj, pro la fakto, ke la juĝo akceptas la patenton de fragmentoj de DNA, se ili estis modifitaj. Do, ĉu estus eble patenti modifitan genon? Krome, la juĝo rilatas nur al homaj genoj, tiel, kelkaj sciencistoj demandis, ĉu estus eble patenti genojn de planktoj, bestoj aŭ de aliaj organismoj, kiel la proteinoj.

# § NULIGITA LA JUĜO KIU KONDAMNIS AL GVATEMALA ĜENERALO

La Konstitucia Kortumo de Gvatemalo ĵus nuligis la juĝon de la pasinta 10-a de majo, lau tiu juĝo oni kondamnis al ĝeneralo Efrain Rios Montt je 80-jara malliberigo pro genocido kaj aliaj deliktoj kontraŭ la homarano pro lia respondenco en la morto de 1771 gvatemalaj indiĝenoj fare de la soldatoj en la jaroj 1982 kaj 1983, kadre de la civila milito kiun suferis ĉi mezamerika ŝtato dum pli ol 30 jaroj. La juĝo ankaŭ nuligas la kondmanon al Mauricio Rodriguez Sanchez, eksa respondeculo de la spiona servo de la gvatemala armeo.

Ene de tiu juĝo, konkrete la 19-an de aprilo, la defendanto de la ĝeneralo Rios Montt malakceptis la prezidantinon de la Tribunalo S-ino Jazmín Barrios, ĉar "li dubis pri ŝia senpartieco".

Malgraŭ la nuligo de la juĝo Efrain Rios Montto restos malliberigita, ĝis kiam nova proceso finiĝos, la defendo de la gvatemla ĝenerala baziĝas sur la fakto, ke la Leĝo pri Nacia Repaciĝo amnistiis ĉiujn deliktojn okazintajn dum la civila milito.

ESPERANTO

*Nova Ŝtato*

Nomo: <u>SUD-SUDANO</u>, ankaŭ eblas la nomo <u>SUDA SUDANO</u>

Origino: Al ĝi apartenas 10 de la 26 federaciaj ŝtatoj de Sudano, kies loĝantaro decidis per referendumo (98,83% favore) la sendependecon de tiuj provincoj. Oficiale Sud-Sudano naskiĝis la 9-a de julio 2011. Ĝi estas membro de UN ekde la 14-a de julio kaj de Afrika Unio.

Pliaj informoj:
Politika reĝimo: Respubliko. Ĉefurbo: Ĵubo
Mon-unuo: Sud-sudana pundo. Oficiala lingvo: angla.
Surfaco: 619.745 km$^2$. Enloĝantoj: 10.334.000
Devizo: *Justeco, Libereco, Prospero.*
Interreta domajno: *.ss*

Flago



Blazono



## Nekrologoj



### LUCAS YASSUMURA (1969 – 2013)

Forpasis pro koratako nia brazila samideano Lucas Yassumura, membro de EJA. Li estis advokato, publika funkciulo, poligloto, oficiala tradukisto, instruisto de la angla, hispana kaj esperanto, radioparolisto. Lucas loĝis en la urbo Jundiai (Sankta Paŭlo), li lernis la japanan kaj italan lingvojn de siaj geavoj kaj 12-jaraĝe li eklernis esperanton.

Li regis la radio-programon "Parolu, Mondo!", dissendita de Radio Boa Nova, li estis ankaŭ komisiito de UEA por la Terminologia Esperanto-Centro. Lia kutima slogano estis: *Sekvu vian revon! Vivu ĝin! Realigu ĝin!.*

*(el BEL-informas n-ro 11/2013)*



### KAREL TRAXLER (1914 – 2012)

Emerita juĝisto, li mortis la 30-an de majo en Pribram (Ĉeĥio). En la jaro 1986 aperis liaj *Esperanta-ĉeĥa jura vortaro* kaj *Ĉeĥa-esperanta jura vortaro.* Al la AEST-kajero de 1980 likontribuis per la studo *"La fonemo –ĥ- kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio.* Por la sporta vortaro *Saluton, amiko!* (1988) li kunlaboris pri la Esperanta kaj ĉeĥa partoj.

*(el Esperanto julio-aŭgusto 2012)*

§

Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) junio 2013.

Prezentita en Rejkjaviko (Islando), okaze de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, 20-a – 27-a julio 2013.